

39

2



# AMERIKA

# ESPERANTISTO

E



M. MARCOVIAN

## CONTENTS

	Page
Club Directory .....	2
Ludoviko Lazaro Zamenhof—Portrait.....	3
Kial nenio Povas Malhelpi la finan Venkon.....	4
La Vojo, poem Zamenhof.....	5
The Way, Translation, Geo. J. Drew.....	5
Patrino, Margaret L. Blaise.....	6
Jan Amos Komensky, J. J. Burita.....	8
Fabelo pri La Malsaga Viro, Lehman Wendell.....	9
Novaĵoj el Eksterlando.....	9
Esperanta Movado inter usonanoj.....	10
Michigan University Professors Advocate Esperanto....	12
High School Students Babilas Esperantajn Frazojn....	12
Esperanto Broadcasting Hours in U. S.....	12
Every Good and True Esperantist Should Join U. E. A....	13
U. E. A. Services, Henry W. Fisher.....	13
Deziras Korespondi .....	14



# AMERIKA ESPERANTISTO

## OFFICIAL ORGAN OF THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, INC.

A propaganda organization for the furtherance of the study and use of the  
International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00; Contributing \$3.00; Sustaining \$10.00;  
Life Members \$100.

### CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

Group Charter—\$1.00.

#### JERSEY CITY, NEW JERSEY \*

Esperanto Eduka Klubo  
578 Jersey Ave., Jersey City, New Jersey.  
Miss Sophie Schwartz, Sec. Classes for children every Wed. from 6.30 to 8; for adults from 9 to 9.30; Mrs. Julia Goldzier instructor. Barco every 2nd Saturday of the month.

#### BERKELEY, CALIF.

Berkeleja Esperanto Rondo.—Hilda F. Mills, Secy., 18 Northampton Ave., Berkeley, Calif. Meets Saturdays 7.30 P. M., Meeting House of Society of Friends.

#### SAN FRANCISCO, CALIF.

Esperanto Association of California, Inc.—Rooms 309-311 de Young Building, San Francisco. Miss L. J. Marshall, Sec.

#### DENVER, COLORADO

Denver Esperanto Society meets Wednesday at 8.00 P. M., Room 2, 1310 Welton Street. W. A. Buchheim, Sec., 1435 Race St.

#### WASHINGTON, D. C.

Kolumbia Esperanto Asocio. and class, Thursdays, 8.30 P. M.—706 11th St., N. W. Apt. 53.

#### ST. PETERSBURG, FLORIDA

Amikeco Rondo meets Tuesdays 4.00 P. M., Fridays 8.00 P. M. E. E. Owen-Flint, Sec. Princess Martha Hotel, Opp. P. O.

#### CHICAGO, ILLS.

La Gradata No. 1 meets at 1500 Cullerton Ave. Vac. Popela, Sec., 1657 W. 19th St.  
La Gradata No. 2 meets at 365 W. Madison St. F-ino L. M. Stanton, Sec.

La Gradata No. 3 meets at Ridgeland & 26th Place. John Knotek, 2614 S. Kenilworth Ave., Berwyn, Ill.

Konsilantaro meets at 365 W. Madison St. Sec. F-ino M. Simonek, 1500 Cullerton Ave.

#### ROCKFORD, ILLS.

Amerika Esperanto-Instituto, 602 7th St. Kunvenoj la unuan kaj trian dimacon je la 10a horo.

#### TOPEKA, KANSAS

Topeka, Kansas Esperanto Association. Rev. J. H. Fazel, World Delegate, Prez. Capt. Geo P. Morehouse. Vice-Prez. Mr. Warren Davis. Sek-ino, S-ino Lida R. Hardy, 1731 Lane St.

#### BOSTON, MASS.

Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. Miss M. Butman, Secretary.

#### WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P. M.

#### BALTIMORE, MD.

La Baltimore, Md., Esperanta Rondeto meets 1st and 3rd Wednesday evenings in month at Md. Academy of Sciences.

#### DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 2916 East Grand Blvd.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A. M. to 9 P. M. except Tuesday and Friday. Classes meet Tuesday and Friday, 8.10 P. M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 C. Canfield Ave.—B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

#### MINNEAPOLIS-ST. PAUL

Twin City Esperanto Club, meets for dinner and program 6:30 p. m. 2d Tuesday in each month at Minn. Union Bldg., University of Minnesota. Charles W. Barnes, Secretary, 1001 Commerce Bldg., St. Paul, Minn.

#### NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society.—Catherine M. Healy, St. Paul's Place. The Barco, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Avenue.

#### WEEHAWKEN, N. J.

Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters: Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second, Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

#### CLEVELAND, OHIO

Cleveland Esperanto Society, Main Public Library. Meets at 7.30 P. M. first and third Wednesdays of each month. S. Kosminski, Sek., 3406 Mayer Ave.

#### PHILADELPHIA, PA.

Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Sec'y. West Phila. High School for Boys. Monthly meeting for business every fourth Friday at Y. W. C. A., 18th and Arch Sts., 8:15 P. M. Social and class meetings on same hour and place on other Fridays. Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Deligitado de U. E. A.). Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

#### MILWAUKEE, WISCONSIN

Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M. Esperanto Club of Milwaukee, J. R. Williams, Pres., 718 Buffum Street; S. Lilwin, Sect., 671—14th Avenue.

#### MADISON, WISCONSIN

Esperanto Office, 119 W. Main Street.



# Amerika Esperantisto

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Post Office at St. Paul, Minn.,  
under the Act of March 3, 1879.

Published on the 5th day of each month by  
THE ESPERANTO ASSOCIATION of North America

1001 Commerce Bldg.  
St. Paul, Minn.

One Dollar a Year

---

Vol. 39

DECEMBER, 1927

..... No. 2

---



Nia Majstro, Ludoviko Lazaro Zamenhof,  
Naskiĝis 15 Dec. 1869—Bielstok,  
Mortiĝis 14 Apr. 1917—Varsovio



## KIAL NENIO POVAS MALHELPI LA FINAN VENKON DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO.

(Laŭ parolado de Sro Bouška aranĝis J. J. Burita)

Dum preskaŭ tricent jaroj multaj homoj kun sperto en la vivo internacia forte sentis la bezonon de ia komuna interkomprenilo. Ĉirkaŭ ducent proponoj de seriozaj sciencistoj kaj naivaj fantaziuloj estis konstruitaj. El ĉiuj tiuj projektoj kelkaj estis teorie tre bone pripensitaj—tamen ĉiuj restis sen praktika sukceso. Kaj kion penis fari tiom da ĉuispecaj homoj, tion sukcese atingis juna, malriĉa studento kun ne tro grandaj scioj lingvaj kaj filologiaj.

Ĉu li estis Geniulo? Certe—Certe Geniulo. Sed ĉu tio klarigas ĉion?—Ĉu la intuo decidas ĉion?—Certe ne!—Mi pensas, ke grandan parton ludis la kondiĉoj, la cirkonstancoj, en kiuj li vivis.

Kiu estis Zamenhof?—Unue, li estis kuracisto—do homo instruita per naturscienco. Due rusuja Polo—do Slavo. Kaj fine—Hebreo.

Jes, homo natursciencie edukita, Slavo kaj Hebreo en unu persono povis sukcese plenumi treege malfacilan taskon krei el la ekzistantaj lingvoj, lingvon novan, lingvon kompreneble ne perfektan, sed pli perfektan ol lingvoj ekzistantaj, kaj tial plene sufiĉantan por la bezonoj de lingvo internacia. Minimume tiuj ĉi cirkonstancoj multe helpis al la sukceso.

Nur homo kleriĝinta per naturscienco, homo sen trograndigita respekto al historiaj okazoj kaj filologiaj komplikajoj, nur homo kun senco por realaj bezonoj kaj por la plej granda libereco, povis havi la komprenon por la maksimuma simpligigo de la lingva maŝino kaj kuraĝon forigi ĉiujn senbezonaĵn aŭ hazardajn detalaĵojn de la lingva peza balasto, kiu per historia evoluo devenis kaj daŭras en la lingvoj naturaj. Ŝajne la plej kompetenta homo—filologo—devis ĉiam malsukcesi. Li ne povis liberigi sin de la riĉeco de formoj kaj formuloj. Lia kreaĵo devis esti ĉiam **komplikita, malsimpla, sekve malfacila kaj pro tio ne akceptebla.**

**Klera Slavo** scianta fremdajn lingvojn, respektanta la fremdularon, komprenanta la egalecon de la nacioj kaj rasoj de eŭropa civilizacio povis respekti rajtegale spiriton de rasoj romana, germana kaj slava kaj enkonduki la bezonajn lingvajn elementojn laŭ iliaj veraj graveco kaj signifino.

Romano aŭ Germano, kiu ordinare ne scias slavajn lingvojn, eĉ ilin ignoras, ne povis lokigi en la lingvon la simplecon de la slava sintakso, la slavan absolute liberan kaj naturan vortordon, la slavan aranĝon de frazoj, la elementojn per kies enkonduko Esperanto tre multe gajnis.

Hebreo, kiu havas sencon por la bezonoj de praktika vivo, kiu respektas aliajn, homo libera de ĉiu ŝovinismo, internaciema, homo kun hebreaj liberalismo, humileco, laboremo kaj persistemo povis atingi la **neŭtralan** karakteron de la lingvo—povis sukcese kompromisi inter la lingvoj batalantaj pri sia lokigo en lingvon internacian.

Sajnas al mi, ke tiel devis esti, ke sole Slavo-Hebreo instruita natursciencie povis konstrui **akcepteblan** lingvon **vere internacian.**

Vere efikis la klero kaj personaj kvalitoj de la kreinto kune kun genio, sed la cirkonstancoj aluditaj estis certe ankaŭ gravaj komponentoj de la procedo, el kiu rezultio kreo de Esperanto.



## LA VOJO

Dr. L. L. Zamenhof

1.

Tra densa mallumo briletas la celo  
 Al kiu kuraĝe ni iras,  
 Simile al stelo en nokta ĉielo,  
 Al ni la direkton ĝi diras.  
 Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,  
 Nek batoj de l' sorto, nek mokoj de  
 l' homoj,  
 Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita  
 Ĝi estas, la voj' elektita.

2.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
 Ni iru la vojon celitan!  
 Eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
 Traboras la monton granitan.  
 L'espero, l'obstino kaj la pacienco—  
 Jen estas la signoj, per kies potenco  
 Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
 Atingos la celon en gloro.

3.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas  
 Pri l' tempoj estontaj pensante.  
 Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas  
 Ni semas kaj semas konstante.  
 "Ho, ĉesu!"—mokante la homoj ad-  
 monas,—  
 "Ne ĉesu, ne ĉesu!"—en kor' al ni sonas:  
 "Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,  
 Se vi pacienco eltenos".

4.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj  
 Velkantajn foliojn deŝiras,  
 Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,  
 Ni forton pli freŝan akiras.  
 Ne mortos jam nia bravega anaro,  
 Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,  
 Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,  
 Al cel' unu fojon signita!

5.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
 Ni iru la vojon celitan!  
 Eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
 Traboras la monton granitan.  
 L'espero, l'obstino kaj la pacienco—  
 Jen estas la signoj, per kies potenco  
 Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
 Atingos la celon en gloro.

## THE WAY

1.

Through uttermost darkness is gleaming  
 the goal,  
 To which we courageously go:  
 It guides on the main, like the star at the  
 pole,  
 By which our direction we know.  
 No fear of night phantoms can alter our  
 plan  
 Nor knocking of fate or the mocking of  
 man;  
 For definite, clear and as straight as a ray  
 Our chosen ideal and way.

2.

Courageous, determined and faltering not,  
 Let's all to that chosen goal flock  
 As water that constantly drops on one spot  
 Will dig through the hardest of rock.  
 That patience and hope with a purpose so  
 strong  
 Is ever the means by which we must ere  
 long  
 By step after step and hard work, come to  
 claim  
 The glory to which we set aim.

3.

We sow and we sow and we never relax  
 And wait for the harvest to grow;  
 Forgetting the seed that we lose in our  
 tracks;  
 Continue to sow as we go.  
 "Ho stop there!" the ignorant boldly de-  
 mand;  
 "Continue!" a voice in our heart does  
 command.  
 "Determined and patient continue to serve  
 Posterity's thanks to deserve."

4.

Though droughts should continue or  
 storms fiercely blow  
 And tear off the leaves that are wilt;  
 Be thanks to the wind and the cleansing;  
 we know  
 New vigor in sequence is built.  
 Our brotherhood valiant shall live through  
 the years:  
 For wind and for droughts it no longer  
 has fears:  
 Is tested and hardened and signed to the  
 role  
 Determined to go to the goal.

5.

Courageous, determined and faltering not,  
 Let's all to that chosen goal flock;  
 As water that constantly drops on one spot  
 Will dig through the hardest of rock.  
 That patience and hope with a purpose so  
 strong  
 Is ever the means by which we must ere  
 long  
 By step after step and hard work, come to  
 claim  
 The glory to which we set aim.

Translation from L. Zamenhof by Geo. J. Drews, 9, 25, 1927.



## PATRINO: UNU TAGO EL ŜIA ĈIEA VIVO

(Originale verkita de Margaret L. Blaise).

Infanoj, miaj karaj! Vekiĝu! Vi ja estos malfruaj, se vi ne rapidos. Sed mallaŭte! Mallaŭte! Ne veku la fratineton!

Tiel parolas la patrino, enirinte la ĉambron de la infanoj. Estas vintra mateno, tre malluma kaj malvarma. Sed infanoj devas iri lernejon kaj patrinoj devas ilin rapidigi, la sezono estu kiu ajn.

Jen, Karlĉjo, viaj botoj. Jen, Marinjo, viaj ŝtrumpoj. Helenjo, mi verŝos akvon por vi. Henriko, kuru malsupren—sed ne brue—por diri al Mario, ke ŝi rapidu meti la manĝilaron sur la tablon. Karlĉjo, estu kuraĝa, ne ploretu—baldaŭ estos pli varme al vi.

Parolante, kuraĝigante, helpante, la patrino infanojn preparas. Poste, portante dorse le plej junan knabon, ŝi malsuprenigas ĉiujn kaj ilin sidigas ĉe la tablo. Baldaŭ, la geknaboj, varmigitaĵoj kaj refreŝigitaĵoj, radias je sano kaj kontento, kaj post reciproka kisado ili adiaŭs la patrinon kun ĝojaj ekkrioj; dum ili foriras, glitante kaj ludante, sed samtempe rapidante, al la lernejo.

La virino ilin regardas ĝis ili perdiĝas en la malproksimo, kaj tiam iom malrapide kaj penseme sin turnas al la ĉiutagaj devoj. Ĉu ŝi iomete pripensas la belan kaj ĝojplenan propran junecon, ĝin komparante kun la nuna sorto? Eĉ se jes, ŝi tute ne plendas, sed akceptas—kiel preskaŭ ĉiuj patrinoj—tute volonte la laborojn kaj zorgojn de patrineco kune kun la sankta respondeco kaj plezuro.

Interne de la domo, ŝi preparas pli abundan manĝon por la iom postulema edzo; parolas kun li pri liaj aferoj; aranĝas la laboron difinitan por la tago kun la juna knabino, kiu ilin servas; kaj tiam banas kaj revestas la malgrandan "reĝinon" de la familio, unujaran filineton. Kiam la lasta ree dormas, la patrino eliras por viziti butikojn kaj mendi provizaĵojn por la tago aŭ postajn tagojn. La forestantaj familianoj ne revenos antaŭ la frua vespero, ĉar lernejo kaj oficejo kuŝas iom malproksime. Sed la dommastrino ne povas ripozi. Tute ne! Ŝi devas, plej ame, elpensi kaj prepari bonajn manĝaĵojn, taŭgajn egale por la infanoj kaj edzo. Ŝi devas ĉiam atenti la bubinon. Ŝi kudras, senpolvigas, kaj kun la helpo de la servistino, aranĝas la litojn. Tempo ja flugas—kaj ĉiam plej rapide ĉe patrinoj.

Tamen, fine sonas ekstere ĝoja kriaro, aŭdiĝas forta sed malpeza kurado; tra la pordo enpuŝiĝas feliĉa, malgranda bando de petolemuloj, kiuj rapidas esti unuaj por recevi la patrinan kison; deprenas la ĉapelojn kaj mantelojn, kaj volas, ĉiuj kune, eldiri la plej lastajn novaĵojn antaŭ ol ludi kun bela fratineteto.

Nu, infanoj, ne ĉiuj samtempe—bonhumore admonas patrino dum ŝi atentigas iliajn bezonojn kaj, ridetante, aŭskultas la aventurojn de la tuta, longa tago. Estas facile, konstati la amegon de la infanoj, kaj la fidon, kiun ili havas al tiu kara zorgantino. Unu post alia ili ŝin ĉirkaŭpremas kaj karesas, dum plej juna rampas sur ŝiajn genuojn kaj fiere regardas la aliajn de sia enviata loko.

Patrino, instruistino diris, ke mi estadis bona knabino hodiaŭ. Ŝi laŭdis mian kudradon. Kaj, patrino, ni havos libertagon postmorgaŭ, kiam la ekzamenoj finiĝas. Ĉu vi kondukos nin al la butikoj, Panjo? Ĉu ni povas inviti kamaradojn por teopreni? Ĉu Paĉjo permesos ke ni ludu en la manĝosalono? Panjo, ĉiuj miaj kalkuloj estis ĝustaj, kaj la ĉefinstruisto promesis, ke mi ricevos premion, k. t. p., k. t. p. Tiamaniere la ĝoja kriaro daŭras, ĝis tiu, al kiu ĉio direktiĝas, ŝajniĝas, ke ŝi estas tute konfuzita, kaj



metante la manojn al la oreloj respondas: Ho, karaj, lasu al mi tempon por spiri. Atendu iom kaj me atentos al ĉiu. Tiam ili obeeme silentas kelkajn momentojn, dum plej aĝa knabino helpas ordigi la tablon por la manĝo, kaj la aliaj tri aranĝas sin ĉirkaŭ la lulilo de la infanino, kiun, alterne, ili karesas kaj incitas.

Je la alveno de la patro, aŭdiĝas alia ĝojekkrio, sed ĝi ne daŭras longe, ĉar la geknaboj scias de sperto ke Paĉjo ne havas tempon (kiel patrino havas); ke Paĉjo kredeble estas okupita kaj laca (neniam Panjo estas); ke Paĉjo, fine, kvankam bona kaj saĝa, ne komprenas ilin (kiel Panjo komprenas). Manĝo sekvas, dum fratineto estas zorgata de la servantino en alia ĉambro; kaj, poste, la infanoj iom studas dum patrino enlitigas la dormeman infaninon. Tiam ŝi rakontas historiojn al la du junaj geknaboj, dum la pli aĝaj laboras ĉe la tablo—de tempo al tempo iom timeme kaj plenrespekte petante helpon de la patro. Tion li donas, tamen, sufiĉe volonte, ĉar li ilin tre amas kaj iom fieras pri ilia lerteco; sed neniam li atentis ilin tre longe, ĉiam rapide relege la ĵurnalon aŭ gazeton kiun li prenas laŭprefere de la tableto ĉe sia flanko. Bone instalita en granda apogseĝo apud la fajro, pipo en la buŝo, pantafloj sur la piedoj, li estas komforta kaj feliĉa, kaj kelkafoje admire regardas la grupon ĉirkaŭ si.

Venas la oka horo. Infanoj devas dormi, diras Patrino. Venu, karaj miaj, ni supreniros kune. Formetu la librojn. Kisu la patron. Karlĉjo, lasu min vin porti. Helenjo, fermu la pordon mallaŭte, kaj tiam portu la kandelon. Nun, ĉar estas malvarme ĉi tie supre, ni preĝos antaŭ ol depreni la vestojn. Dolĉe, dormeme kaj iom mallaŭte la infanoj preĝas, ripentante frazon post frazo, la vortojn de la patrino. Unu estas sur ŝiaj genuoj, la aliaj tri genuflekas apud ŝi, ĉirkaŭitaj de ŝiaj brakoj. Sekvas strofo de infana himno, kaj, poste, dum kelkaj momentoj, la patrino konsilas kaj admonas. Dolĉe, ŝiaj paroloj enprofundiĝas en la korojn. Longe ili tie restos. Ofte, en estonto, ili reaŭdiĝos mistere, eble neatendite, sed ĉiam kun kapablo reveki la bonan senton kaj inspiri la pravan agon. Unu post alia la infanoj enlitiĝas, kaj patrino fine aranĝas la litojn, enpuŝante la kovrilojn, por ke oni ne elfalu, kaj kisant la varmajn, amemajn lipojn de filoj kaj filinoj. Ŝia kiso estas dolĉa kareso, ĉia adiaŭo estas sankta beno, ŝiaj mallaŭtaj paŝoj, forirantaj en la koridoro, estas muzika memoro en la feliĉaj songoj de la jam ekdormantoj.

Malsupre ŝi ankoraŭ laboras, riparante truetojn, aŭ surmetante butonojn je la vestoj de la infanoj, dum de tempo al tempo ŝi parolas kun ilia patro. Fine ŝi povas ekripi, sed ĉu ŝi dormas? Ne, patrinoj **neniam** dormas. Unue, ŝi devas reviziti la ĉambrojn de la geknaboj, tiam ŝi devas nutri kaj atenti la bubinon. Kaj kiam ŝi fine kuŝiĝas, ŝi longe, longe pensas pri ĉiuj siaj karuloj. Ofte okazas ke, aŭskultante, ŝi aŭdas ektuseton au ekkrion el unu el la aliaj ĉambroj. Tiam ŝi vokas: Kiu ploras?— Estas mi, mi havas dentdoloron, venas respondo el la mallumo. Sed patrino ĉiam konas la voĉon kaj ĝin lokigas. Eble ŝi diras: Ne ploru! envenu, do, en mian liton; sed mallaŭte, ne veku la patron kaj ne veku fratineton. Nun, kiu flanko? Tiu? Lasu min froti ĝin. Kuŝigu vian kapon sur mian bruston... La larmoj ĉesas ruli, la ĝemetoj silentiĝas. Malgrandaj brakoj ĉirkaŭtenas la patrinan kolon. Patrinaj manoj frotas, frotas, patrino voĉo lulas, lulas. Patrino buŝo kelkafoje kisas, kaj infanaj ĉagrenoj forflugas magie, dum patrino zorgas kaj gardas.

Ho, gefiloj, amu vian patrinon—vi neniam povas ŝin rekompenci **sufiĉe**.



## JAN AMOS KOMENSKY (COMENIUS)

## La lasta episkopo de la "Bohemaj Fratoj"

aranĝis J. J. Burita

Inter la plej frutempaj pioniroj de nia movado estas sendube J. A. Komensky la bohema patriarko de pedagogio. Li mortis la 15an de novembro 1670 en Amsterdam kaj post unu semajno estis enterigita en Naarden, Holandujo. Lia multam-pleksa intelekto traesploris ankaŭ la demandon pri lingvo artefarita kaj starigis ĝiajn fundamentojn en lia fama verko "Via lucis" (La vojo de la lumo) 1642.

Li vidis tre klare ke la senlima diverseco de lingvoj multe malhelpas la disvastigadon de la scienco inter ĉiuj nacioj kaj diris:

"Per unu lingvo disvastigadus la kulturo pli rapide, pli facile, kaj pli daŭre, kaj tiu unu lingvo mem estus la plej evidenta signo, ke la komuna lumo penetris al ĉiuj, kaj ĉiu estus en ĉiu lando, en ĉiu klimato kiel hejme, ĉie komprenante ĉiujn kaj estante komprenata de ĉiuj.—Restas do nenio alia, ol krei lingvon novan, superantan ĉiujn lingvojn jam konatajn unue per facileco, por ke oni povu ĝin lerni sen perdo de tempo. Due per dolĉeco, por ke estu ĝuo ĝin lerni kaj ellerni, trie per perfekteco, por ke ĝia posedo tre utilu al aferoj mem. Jam el kelke da ĉi tiuj fragmentoj evidentiĝas, ke ĉiu Esperantisto havas la sanktan devon kun respekto rigardi al la granda Bohemo, pri kiu kantas Dr. Schulhof en sia bela poemo "J. A. Comenius." Tiu poemo estas dediĉita al fervora nederlanda samideano J. L. Bruijn.

Ĉu vi konas malgrandetan urbon,  
kiu ĉe vi, ie en la Nordo  
kuŝas dolĉe ĉe la mara bordo?  
Naarden estas ĝia simpla nomo  
kaj en tombo tie sub la tero  
dormas dormon tute sen sufero  
sanktaj restoj de l' plej bona homo.

Se vi konas urbon tiun vian  
kaj vi venos tien per okazo,  
mi vin sinjor', petas kun emfazo,  
lin vizitu en libera horo,  
Por la samaj celoj idealaj,  
kiujn ni nun sekvas, plej kristalaj,  
batis ankaŭ lia bona koro.

Kiel vi kaj mi, li ankaŭ songis  
en la verkoj belaj sen komparo,  
pri la unueco de l' homaro,  
pri eterna kaj senĉesa paco;  
sed al li kaj lia flama vorto  
malfavora estis viv' kaj sorto  
kaj sur tero mankis por li spaco.

Sed li fine trovis la trankvilon  
kaj kun songo sia, ĉarma, granda,  
en malgranda urbo nederlanda  
dormas tiu nia antaŭulo  
kaj sur lia tombo jam sen larmo  
kantas nune nur la birda svarmo  
kaj ekfloras simpla konvolvulo.

Se vi tien venos, mi vin petas;  
dirn al li, ke en lia lando  
estas nune viva propagando  
por la songo lia filozofa,  
ke en kor' de multa jam Bohemo  
gaje kreskas lia bela semo  
en la form' de lingvo Zamenhofa.

El la holanda gazeto "De Avondpost" en Haag.



## FABELO PRI LA MALSAGA VIRO

Venis iam viro el trans la maro al la granda lando Usono. La lingvon de la nova lando li ne parolis, kaj apenaŭ li komencis studi ĝin, li trovis ĝin tre malfacila kaj ofte nelogika. Al liaj oreloj la nova lingvo ŝajnis malbela, ofte ridinda. Kion faris tiu viro? Li rezonis tiamaniere: "Jen estas lingvo parolata de granda nacio, sed tiu lingvo estas malbela, nelogika, malfacila; mi devas ĝin reformi. Por mi tio estos ja facila afero, ĉar kiam mi loĝis en mia bela patrolando, Kukumo, oni ja konsideris min saĝa viro, kies scio de la kukuma lingvo estas profunda."

Sed kiam li parolis al la Usonanoj pri lingvoreformo ili nur ridis al li. Ili ŝerce proponis, ke li malplenigu la riveron Mississippi per sitelo. Eĉ la infanoj mokis lin, kaj la strat-buboj almontris al siaj kapoj kvazaŭ por diri, "Li estas freneza." La viro fine devis forkuri al alia urbo.

Tie li ne plu kuraĝis paroli pri reformoj; li evitis la nelogikan usonan lingvon, kaj parolis ĉiam kukume kun la "malnovlandanoj." Sed pro komercaj aferoj li devis kutimigi sin al la Usonanoj, kaj iom post iom li komencis uzi ilian lingvon. Kaj jen io mirinda okazis. Ju pli li uzis la lingvon, des pli li trovis ĝin belega, kaj post kelkaj jaroj li fariĝis ĝia forta defendanto. Kiam aliaj enmigrantoj mallaŭdis la malbelan, nelogikan Usonian lingvon li estis la unua kiu tondris kontraŭ ilia azeneco; li estis la unua kiu montris al ili la ĉarmon de la novlanda lingvo; li estis la unua kiu konsilis, ke ili ellernu la lingvon antaŭ ol malsaĝe kritiki.

Tiu fabelo eble ŝajnas absurda, sed ĝi havas paralelon en nia Esperantolando. Nia Esperantolando ne plu estas fantazia loko, ĝi ne plu estas revo de songantoj, nek inkubo de malbona digesto, sed ĝi estas vasta lando kies suno neniam subiras. Miloj kaj miloj da homoj parolas la lingvon de tiu lando, parolas ĝin flue, nature, kaj belsone, kaj trovas ĝin ĉarma esprimilo. Sed la nova enmigranto en Esperantolandon tute ne scias pri tio. Li renkontas tiun noyan lingvon, Esperanto, kaj influata de sia nacieco kaj de sia gepatra lingvo, li trovas vorton, esprimon, kaj gramatikajon, kiuj ŝajnas fremdaj kaj nebonaj. Jen estas danĝera tempo por nia novebakita Esperantisto. Li eble diras al si, "Tiu lingvo, Esperanto, enhavas kelkajn malbonaĵojn, kaj ĉar mi estas saĝa pri lingvaj aferoj, estas mia feliĉa devo perfektigi ĝin." La ridado de la Esperantistaro ne ĝenas lin, egoiste li blinde daŭrigas sian perfektigadon.

En la fruaj tagoj de Esperanto, kiam la movado ankoraŭ estis malforta kaj preskaŭ disfalus ĉe la unua venteto,—en tiu tempo nur unu lerta kontraŭulo ofte estis grava danĝero. Se, krom lerteco, li ankaŭ posedis universitatan diplomon, li eĉ povis minaci la tutan movadon.

Sed hodiaŭ, kiam Esperanto pli kaj pli enpenetriĝas en la vivon, pli kaj pli gajnas novajn adeptojn; pli kaj pli, oficialiĝas, ni ne plu bezonas timi unu kontraŭulon. Li nur al si mem malutilas; malplenigi la Mississippi per sitelo li ne povas.

LEHMAN WENDELL.

## NOVAĴOJ EL EKSTERLANDO

## A GREAT RADIO SUCCESS IN ĈEĤOSLOVAKUĴO

After a great endeavor of Esperanto institutions and many private persons among whom we can cite Sro. Ginz, Sro. Bednar received a permission to begin a course of Esperanto from the station Brno. He will broadcast his lessons twice in every week.

**British Islands**

**In Inswich** was founded a new group "Verda Stelo". Sro. F. D. Murphy teaches Esperanto every Monday.

**Sheffield.** The editor of "Sheffield's Independent" opened a great Esperanto Exposition in the Primary Methodist School. In the evening Sro. Rowlinson, the president of the City Board of Education made a speech in which he announced that the Board will open a night school for teaching Esperanto, if a sufficient number of people will promise to come.

**ĈeĤoslovakujo**

**Praha.** Esperanto Club of Praha celebrated its silver Jubilee and a Forty-year Jubilee of Esperanto. The celebration lasted eight days and included concerts, exposition of **Esperantaĵoj**. All the daily papers had articles about the excellent Exposition.



**Danujo**

**Kopenhago.** Dr. Privat, president of I. C. K., with his wife visited Kopenhagon and spoke at a public reception tendered to him by the local Esperanto club. Newspaper men were present and all the papers brought good reports about the affair.

**Germanujo**

At the annual Exposition of German Labor in Dresden, there was exhibited a collection of Esperanto-gazetaro. Planen i V. The local Esp. group celebrated its 20th anniversary.

**Svisujo**

**Locarno.** The International Educational Congress in Locarno decided to follow the example of Praha conference about Peace Education and will in its coming congresses translate the national speeches in only one language, and that Esperanto.

---

### ESPERANTA MOVADO INTER USONANOJ

